
nia voĉo

madrida esperanto-liceo marto 2012

## EKSPOZICIO EN KVARTALO SALAMANCA

Inter la 1-a kaj 14-a de marto, Madrida Esperanto-Liceo organizas ekspozicion pri Esperanto en Madrido, en la Kultura Centro Buenavista (Avenuo de los Toreros, 5, distrikto Salamanca). La ekspozicio utiligas la panelojn kreitajn de HEF okaze de la 150a datreveno de la naskiĝo de L. L. Zamenhof, kaj kiujn oni montris en antaŭaj okazoj en Madrido kaj en aliaj urboj.




La ekspozicio estos formale inaŭgurita la lundon, 5-an de marto, je la 6,30 vespere, per prelego de José Antonio del Barrio, prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, kun la titolo "La fenomeno Esperanto, 125 jaroj da alitipa komunikado". Poste prezidanto de Madrida Esperanto-Liceo inaŭguros la ekspozicion en la salono.

Estas invititaj ĉiuj esperantistoj (fakte, ni speciale kuraĝigas la ĉeeston de esperantistoj kaj simpatiantoj)

## LIBROFOIRO(?)

Inter la programo de aktivaĵoj de Liceo por 2012, kiun oni aprobis en la Ĝenerala Kunveno okazinta en januaro, elstaras la kandidateco por partopreno en la Librofoiro de Madrido, kun la kunlaboro de aliaj asocioj. Okazos ĝi inter la 27a de majo kaj la 12 de junio en mirinda fono kiel estas la ĝardeno "Parque del Retiro".

Dum februaro ni faris la necesajn demarŝojn antaŭ la organizantoj, por peti nian ĉeeston, kaj ni esperas ricevi la respondon en la unua monatduono de marto.

Se jese, ni tiam faros pli detalan planadon, kun deĵorhoroj de volontuloj. Temas pri foiro 17 tagojn longa, laŭ la jena horaro: Labortage: 11-14 kaj 18-21, Semajnfine: 10:30-14 kaj 17-21:30. Estus konsilinda kunĉeesto de 2 samideanoj dum la matena deĵoro kaj 2 aliaj dum tiu vespera.

Bv. komuniki kun Liceo por sciigi pri via preteco kunlabori. Ni esperas ke plejmulto da homoj ne devos kunlabori dum entute pli ol 3 deĵoroj, depende de la kvanto de homoj sin anoncantaj.

## RETA DISKUTFORUMO

Estis kreita nova forumo por diskuti ajnan temon ligitan al Esperanto, precipe en Madrido. Vizitu ĝin en: http://esperanto.creatuforo.com/

Estas necese unuafoje aliĝi al tiu forumo, kiu krome estas tute senpaga. Poste, ĉiufoje kiam oni volos aliri tien, oni devos skribi kaj sian identigilon kaj sian ŝlosilvorton. Enirinte la forumon, estas videbla sur la ĉefa forum-indekso iu strukturo. Tiu organizmaniero estas facile modifebla por ĝin alĝustigi al niaj bezonoj kaj plaĉoj.

## VIZITIS NIN KAJ VIZITIS NI

Kiel ni informis en pasinta numero, la grupo de lernantoj de Esperanto en Toledo invitis nin partopreni la finon de la kurso. Deko da madridanoj akompanis niajn amikojn kastilimanĉanojn, kun aliaj homoj el Ekstremaduro kaj eĉ ekster Hispanio. Malgraŭ la malvarmo, la grupo ĝuis la urbon kaj ĝiajn vidindaĵojn, kaj konstatis la progreson de la movado en la najbara regiono, kie ĉijare okazos interalie la venonta Hispana Kongreso.

Du esperantistoj, UEA-delegito Laurent kaj lia edzino Xiao Xiao, el la urbo Angers (300 km-ojn sud-okcidente de Parizo) veturis en Hispanio dum kelkaj tagoj. Ili vizitis Madridon, ĉiĉeronitaj de la ĉitieaj esperantistoj vendrede la 17-an kaj sabate la 18-an de februaro.

La 27-an de februaro, nia ĉina-valencia amiko kaj iama MEL-prezidanto Augusto Casquero vizitis la lundan kunvenon de Madrida Esperanto-Liceo.

## ESPERANTO EN LA TRADUKILO DE GOOGLE

La entrepreno Google anoncis ke ĝia maŝintradukilo Google Translate aldonis Esperanton al la listo de lingvoj el aŭ al kiu ĝi tradukas tekstojn aŭ retejojn. Tion anoncis ĝia teĥnika teamo en mesaĝo en sia oficiala blogo. La kvalito de la tradukado ankoraŭ ne estas perfekta, sed temas pri tre bona novaĵo, kiu ebligos alproksimigi nian kulturan trezoron al la ekstera komunumo.

## BITOTEKO EN "HISPANA"

*Hispana* estas projekto de la Ministerio pri Edukado, Kulturo kaj Sporto de Hispanio celanta arigi la hispanajn bitkolektojn de arĥivoj, bibliotekoj kaj muzeoj, inter kiuj elstaras la bitotekoj de hispanaj universitatoj kaj de la Aŭtonomaj Komunumoj. *Hispana* plenumas do, je nacia nivelo, la samajn funkciojn ol *Europeana*, kaj ĝi kolektadas ĝis nun la dokumentojn de 162 bitotekoj. Nun ankaŭ troviĝas tie Bitoteko, la reta arĥivo kaj biblioteko de HEF: http://hispana.mcu.es/es/comunidades/registro.cmd?id=1808. Tio signifas pli da videbleco por ni ĝenerale, kaj la pli konkretajn avantaĝojn ke eblos aliri niajn dokumentojn rekte el la ministeria retejo kaj fari serĉon en ĉiuj kolektitaj bitotekoj samtempe.

## PLIA HELPO BEZONATA EN TANZANIO

Post la elektrizado de dispensario en vilaĝo Marambeka, en kiu kunlaboris madrida samideano, nun estas bezonata havi almenaŭ 3-radan motorciklon kiu povus tuj alporti la malsanulojn de vilaĝoj al la dispensario au de la dispensario al la distrikta hospitalo en Bunda urbo, 45 km-ojn for. La petrolon pagos la distrikto kaj la ŝoforo ricevos poŝ-monon de la komunumo. La lokaj esperantistoj petas helpon por aĉeto de la tricikla motorciklo. Kosto estas 1800 eŭroj.

## MADRIDA PROGRAMO

La kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde je 18.30, en la sidejo de la grupo. La 26-an de marto estas programita parolado de Carmen Suárez pri Sirio (en kiu ŝi parolos pri siaj vojaĝoj tie kaj la lastaj okazintaĵoj en tiu lando

La 3-an de marto, sabate, je la 5-a, okazos babilrondo en kafejo 4D, kun speciala atento al la novaj lernantoj de la progresiga kurso.

La ekskurso programita por la 11a de marto ŝanĝas sian daton al la dimanĉo 25a de marto. Temos pri ĉirkaŭiro al monto Bañaderos, sen aliri ĝian supron (sed kuraĝuloj rajtas supriri). Starto ĉe Puerto del Cardoso, tra Puerto de la Hiruela kaj reveno tra alia vojo. Tio troviĝas en la nordo de la madrida provinco, ne for de Somosierra. Estas tre facila vojo, 12 km, preskaŭ sen deklivoj, kun ampleksaj vidaĵoj. Oni kunportu proviantojn, por pasigi la tutan diurnon. Rendevuo: en Plaza de Castilla, ĉe la akvobaseno, la 25an de marto je la 09:30. Por organizi lokon en aŭtoj, partoprenontoj anonciĝu ĉe saluton@wanadoo.es, dirante ĉu ili disponas aŭton aŭ ne.

La kursoj gvidataj de Pedro Hernández plu daŭras ĉiusabate matene, de la 11-a horo. Vizitu http://www.facebook.com/cursosdeesperantoenmadrid.

madrida esperanto-liceo

San Alejandro 6-4ºB-ext. 28005 Madrid (nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7, Madrid

http://www.esperanto.es/mel/ saluton@wanadoo.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com